



ENHAVO:

januaro - 1998 - N° 19-a
ASTURIO

- 2...Nia Urbo
- 3...Zamenhofa festo en Aviles
- 4...La semoj el la abundo
- 5...Leviĝo
- 6...Bezono de la Internacia Lingvo tra la Historio
- 7...Grekaj Statuoj
- 8...La plu antikva trinkaĵo: La vino
- 9...Mesaĝoj
- 10...L.L.Zamenhof antaŭ la naciismo
- 12..Son de la loma
- 13..Unua Kanguruo
14. Dankon, la vivo
- 15..Amuzajtoj
16. Kune ni kantas



**REVUO DE LA AVILESA
ESPERANTO - GRUPO**



NIA URBO

VOJOPLANOJ (Daŭrigo)

Finigante la vojoplandoj, ni ne forgesu aliajn proksimajn lokojn: la nekredoblan fiŝantan vilaĝon de Cudillero (je 25^a. Km.); la urbeton de Pravia, iutempe ĉefurbon de la regno de Asturio (je 24^a. Km.); la plaĝojn de Castrillón, (inter 5^a. Kaj 16^a. Km.); la lumturon de San Juan je la enirejo de la enfluejo de Avilés (je 5^a. Km); la kabon de Peñas, kun ĝia lumturo, loko de sovaĝeta beleco (je 17^a. Km); la fiŝantajn vilaĝojn de Luanco (je 14^a. Km) kaj Candás (je 17^a. Km) Ambaŭ estas vilaĝoj tre interesaj.

La du plej gravaj urboj de Asturio estas Oviedo, la nuna ĉefurbo kaj Gijón; ambaŭ estas situantaj malpli ol dudek minutoj, per aŭto, je Avilés. De ĉi-tie jam proksimume la marbordo aŭ la interna parto de la regiono, la translokado estas facila kaj komforta, ebligante la vojaĝon de iro kaj reveno, je la sama tago en iu ajn loko de turisma intereso ene la Principado.

Finajo el nia urbo
La Redakcio.-

Estraro de ANTAŬEN

Prezidanto: Nicolás Muñiz

Sekretarino: M^o Luisa Menéndez

Kasisto: Celestino Fernández

Bibliotekisto: César García

Desegnisto: Cisimo Rabanedo

Gekomitatanoj:

M^o José Álvarez Faedo

Luis González

David Menéndez

Eva González

Daisi Murillo

Nia adreso:

Casa Municipal de Cultura

33400 AVILÉS (Asturias)

Tfn^o. 98-5541127

Subvenciita per la Registraro de la Avilesa Municipo.

Depósito legal n^o As 1398 (9)

ZAMENHOFA FESTO EN AVILÉS

Dimanĉo 14^a. Decembro 1997-

-0-0-0-

Unu fojon plian avilesa grupo "Antaŭen" celebris la 138-an. detrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, aŭtoro de neŭtrala lingvo Esperanto,

La programo pretigita tiu-ĉi jaro estas la jena:

11'30-a. horo Sankta Meso-en Esperanto- en la kapelo "Jesuo de Galiana "

12'30-a. horo Kultura agado, kiu okazis en la Domo de Kulturo, laŭ la jenaj partoprenantoj:

1° Lisa Ejarque Alvarez interpretis la poemeton "Vi Kantu".

2° Nicolás Muñiz parolis pri la libro de Juan Carlos de la Madrid titolita: "Avilés mil jarojn pri Historio".

3° Du gelernantoj de aktualaj kursoj: Daisi Murillo kaj LuisGonzález interpretis skeĉon titolita "Fresa fiŝo".

4° Prelego de Santiago Mulas, prezidanto de Astura Esperanta Asocio.

5° Maria Luisa Menéndez, prezentis la tutajn partoprenantojn.

14'30-a. horo : frata bankedo en fama avilesa restoracio "La Estaca", strato Llano Ponte, 25.-

Ĉiuj la membroj de Antaŭen profitas tiun-ĉi okazon por deziri al vi, FELIĈAN KRISTNASKON 1997 kaj FELIĈAN NOVJARON 1998.



LA SEMOJ EL LA ABUNDO

Iu junulo savis la vivon al la reĝo Salomon. Tiu ĉi, tre dankema, invitis lin al sia palaco por doni donacon al li.

La junulo, kiu estis tre ambiciulo, prezentiĝas en la palaco la sekvanta tago.

La reĝo, diris al la junulo: -Mi devas la vivon al vi. Diru al mi kion vi deziras kaj mi koncedos ĝin al vi. La junulo respondas: -Mi deziras esti riĉulo.

La reĝo donacis tri semojn al li kaj antaŭ lia mirego diris al li: - Ĉi tiuj semoj kaŝas la ununuran sekreton, kiu ekzistas por fari kapitalon. Se vi scias profiti la semojn de l' abundo, ruzece vi obtenos tutajn la riĉecojn kiujn vi celas. Por fari flori la abundon, plantu vi la semojn kaj irigaciu ilin diligentece sen malfortigi neniam.



Vi scios, ke la fortuna estas malabunda planto kaj nur ĝi kreskos se vi irigacias la semojn kun iu ajn el tiuj ĉi tri aĵoj: larmoj, ŝvito aŭ sango.

La junulo, seniluziiga, dankas al la reĝo kaj li foriris. Kredante ke neniu observis lin, li forĵetis la semojn al angulo.

Salomon, observante tion-ĉi diris al sia helpanto: - Tie iras homon, kiu neniam

sukcesos la abundon, ĉar li ne estas preta por fari iu ajn oferadon.

Moŝto, la tuta mondo konas multajn homojn, kiuj havas malpurajn korojn, ili ne irigacias la semon kun ilia sango, ŝvito kaj larmoj sed ili obtenas grandajn fortunojn.

La reĝo respondis al li: -La homoj, kiuj tiel faras, ili obtenas la abundon...

Vi kaj tiu ambicia junulo, ne rimarkis, ke mi neniam specifikis, ke la semoj kreskas kiam estas irigacitaj kun la propra kuraĝo. Male multaj homoj eltrovis, ke la abundo kreskas tre alta kaj bela kiam estas irigaciata kun la larmoj, la sango aŭ la ŝvito malpropra.

Ludoviko

(Tradukita el la konto de Carmen Posadas)



LEVIĜO



Estu bona. Ne difektu
eĉ la dornon kiu naskiĝas sur la vojo,
ĉar tiu dorno povas esti utila al la ermito
por ŝpini lian vestaĉon per la fadenaĉo de la lino.

Klopodu teni rekte, kvankam sen orgojlo, vian frunton,
ĉar malantaŭ la orgojlo estas kaŝita abismo, ...
Estu ĉiam pura kaj klara kiel fluanta akvo
kiu sinoferas al ĉiuj kaj ĉiam restas la sama.

Faru de vi mem propran kulton. Renovigu ĉiun horon
la oleon el la lampo, kiu lumigas vian preĝon,
ĝis kiam estu eterne super via altaro la aŭroro
kaj sur ĝi, kiel oferdono, metos vian koron.

Perdonu la ofendojn kaj ilin forgesu;
faru en via brusto kalikon por amo kaj konkordo,
kaj oferu, malavare, viajn manojn al la falinto,
kvazaŭ ili estus la apogilo de la kompatindulgo.

Dono al ĉiuj, kiuj suferas, sen pensi pri la estonteco,
ĉar tio estas egoismo. Estas ankoraŭ, multaj,
kiuj pasigas siajn vivojn revante pri la kristana
feliĉo havi la ĉiutagan panon.

Estu donacema. Senvastiĝu kaj rigardu en via konscienco
ĉu estas en ĝi la plej negrava makulo. Banu per klareco
vian spiriton kaj juvelornamu la pacon de via ekzistado,
kiel dio, per la gloro de la Senmorteco.

Verkis: *Luis Menéndez* "LUMEN"

Tradukis: *M^{re} Luisa Menéndez*



REZONO DE LA INTERNACIA LINGVO TRA LA HISTORIO

Daŭrigo

III

Je la komenco de la XVI^a (dekscsa) jarcento, ĉiuj la akordoj redaktitaj en la Hispana, Angla, Germana aŭ Itala lingvoj estis de interna naturo. La Katolikaj Monarkoj uzis la Hispanan lingvon en la rajtigiloj de siaj senditoj; La Germana lingvo estis uzita inter la Germanaj princoj; La Angla en la rilatoj inter Anglujo kaj Skotlando; la Itala lingvo inter la respublikoj de la duoninsulo. Por la internaciaj akordoj kaj negociiloj, je la vera senco de la vorto, oni uzis du lingvojn: la Latinan kaj la Francan lingvojn. Sed jam J. Luis Vives, en lia verko "De Disciplinis" (1532) asertis ke:


Ĝi estis grandioza se ekzistu la nura lingvo kion povis uzi ĉiuj la popoloj... La latina lingvo mortiĝos kaj tiam, alvenos granda konfuzo je ĉiuj la sciencoj kaj granda distancado inter la popoloj.

Malgraŭ tio, je la XVII^a (deksepa) jarcento, la Latina lingvo ankoraŭ okupis elstaran pozicion, la konkurenco de la Franca lingvo, kaj poste de la Angla kaj aliaj lingvoj, oni lasis senti plus ĉiufoje. La granda pensisto kaj filozofo R. Descartes, en letero al la Patro Marsenne de la 20^a (dudeka) de Novembro de 1629 (mil sescent dudeknaŭ) scribis:

Estas multaj personoj, kiuj ege oferus kvin au ses tagojn de sia tempo por povi esti komprenita de ĉiuj la homoj... Mi kuragus esperi universalan lingvon, tre facila por lerni, prononci kaj skribi, kaj, tiu kio estas la plej grava, kiu helpus la racion, prezentante ĉiuj la aĵojn al ĝi, de maniero tiel klara, ke ĝi trovus preskaŭ nebla erari...

María José Álvarez Faedo

GREKAJ STATUOJ



Vi ne enamiĝu neniam el grekaj statuoj. Mutaj kiel almozulaj latronoj. Ili ŝtelas al vi iom post iom vian koron. Vi donas fine al ili vian koron kaj ili avidmanĝas ĝin sen diri vorton. Marmora silento. Kun via brusto nekovrita, riskita ĝin al la misvetero, kiel vagula hundo persekutas poste la eĥo el iliaj paŝoj. Ŝtono sur la pavimero. Griza sur griza.

Travivas ĉia nokto, malpura pro neonlampoj kaj alkoholo, serĉante ilia rigardo ĝis la ektagiĝo. Reveno al la prudento. Brusto enmurigita kun rompita brikoj. Ne estas sufiĉe scii, ke iu ajn el ili estas en via ĝardeno, sur la fonto de la malgajaj nufaroj. Vegetala simfonio sube ŝiaj palaj piedoj, malvarmaj kiel ŝtono en ombro. Ploras la floroj pro ne scii ŝian nomon. Kantas la akvo trairante ŝiajn formojn de miljara statuo. Ridas la akvo en ŝia pubo. Ili oni kisas. Tremas kune. Ili similas ekvivi en la spegulo. Nur efemera bildo, kium la vento lulas.

Tiel malgaja kaj solema. Tiel minerala, tiel senviva. Preĝante elspiraĵo el vivo, rideto sur ŝia eminenta vizaĝo. Luna blanko. Astragvido de delirantaj insomnioj. Vi oferas al ŝi vian vivon dum mala sonĝo iu ajn nokto sole kun via kapkuseno. Vi malsekigas ĝin.

Kristalaj larmoj kiel glacaj lagoj reflektis ŝian vizaĝon per lumo el viaj okuloj. Vi kredis vidi vin en ŝiaj akvoj. Via koro mensogis vin. Vi ne enamiĝu neniam el grekaj statuoj. Escepte se vi deziras koni la Amon.

DAMEGO

LA PLI ANTIKVA TRINKAĴO

LA VINO

Antikva persa legendo rilatas, kiel ekkonis la vinon

La princo Jemshed ordonis surskribi la vorton "veneno" sur kelkaj ujoj el kaprina led, en kiuj li enmetis vinberan suk, pro kaŭze, li trinkis ĝin poste la fermenteco kaj doloris al li la stomakon.

Lia favorata edzino, kiam jam bedaŭrinde ne havis lian favoron, trinkis la trinkaĵon el kaprina led por memmortiĝi. Sed la vino jam estis matura kaj ŝi anstataŭ morti, eksentis gajan, vigan, kaj pro tio sia nekonstanta edzo faris ŝin denove, lia favorata edzino.



La vino penetris en la norda parto el Europo ĉirkaŭ la jaro 600 a.K., sed ĝi estis sen alkoholaĵo ĉar ĝi estas enmetita en malfermaj ujoj.

Kiam aperis la boteloj, ili fermis ĝin per lano impregnata el oleo kaj vakso kaj poste en la jarcento XVII-a ekuzis la korko pro la iniciato de la benediktana monaĥo Don Perignon. La netralasiva ŝtopilo permesis la fermentadon el la ĉampana vino.

Cisimo



MESAĜOJ

La tempo forflugas tiel rapide, ke.....Denove la lumo el nova Kristnasko iluminas al ni. Estas necese, pro tio, ke ni celebriu, unu jaron plian, Zamenhoftagon. Nia grupo, tre plezure, festis ĝin. Kiel ĉiam akompanis nin la gesamideanoj de la najbara urbo el Gijón. Ni, ĉiuj, pasigis neforgeseblan tagon!

-0-0-0-

La vivo plenas de surprizoj. Antaŭ kelkaj tagoj ni sciis, ke, en Tampere funkcias samnomulan grupon al nia de Avilés. Ni konstatis la koincidon per ĝentila letero, kiun ni ricevis de la mem sekretariino.Ŝi petis al ni diversajn notojn pri nia urbo kaj riciprokan korespondadon. Ni tre plezure akceptis ŝian proponon. Tampere kaj Avilés; Avilés kaj Tampere ĉiam ANTAŬEN!!

-0-0-0-

Ni ankaŭ ricevis diversajn leterojn de gekorespondantoj, kiuj loĝas en NIĜNEVARTOVSK - Siberio- Ili estas por ni tre simpatindaj! Estas Aline, Julia, Anĝela, Oksana kaj Daŝa kiuj, en lasta letero, petis al ni fotojn, bildkartojn, ĵurnalojn k.t.p. por fari en sia urbo ekspozicion pri Avilés. Kompreneble ni, dankemas al ili kaj ni jam sendis tion, kion ni konsideris konvena pro tiel ĝentila peticio.

-0-0-0-

Ni daŭrigas kun la lernado de niaj kursoj. Aliaj el niaj studentoj pensas partopreni en la 57-a hispana kongreso, kiu okazos en Valladolid dum la tagoj 1-a ĝis la 3-a de majo.

L.L.Zamenhof antaŭ la naciismoj

verkis: *Faustino Castaño*

Pri diversaj temoj, Lazaro Ludoviko Zamenhof estis homo kiu marŝis tre antaŭe ol siaj samtempoj kaj plejparto el la nuntempa homaro. Tiel ni vidas ke ankoraŭ hodiaŭ, post tuta jarcento, nur malgranda kaj selekta homa kolektivo alprenas kaj prilaboradas lian projekton de universala lingvo. Sed eĉ inter ĉi tiuj selektuloj, multaj ne alprenis nek komprenis aliajn ideojn de la fondinto de Esperanto. Tiel okazas ke por multaj geesperantistoj signifas nenion, ekzemple, la afero de la «interna ideo», kaj ĝis nun atingis neniun ajn sukceson lia ideo pri tuthomara kaj sendogma religio.

Sed hodiaŭ mi volas atentigi pri la sinteno de Zamenhof rilate al alia afero kiu multe furoras en nia epoko. Mi temas pri la naciismoj. Kiel sciante, ni travivas epokon en kiu reviviĝis en multaj terzonoj la naciismaj pasioj. Popoloj aŭ gentoj antaŭe subpremitaj en kio koncernas al iliaj etnaj kaj kulturaj rajtoj reakiris la eblecon laboradi favore al sia etna lingvo kaj kulturo, kaj tiu fenomeno manifestiĝas per la ekzaltado de ĉio naciisma kontraŭpozicie al la universaleco kies esprimo estas nia Esperantista Movado.

Rilate al tio ĉi, la teniĝo de la geesperantistoj koncentriĝas en du ekstremoj: estas gesamideanoj kiuj, tutsimple, partoprenas en la naciisma pasio de siaj respektivaj etnoj aŭ triboj kaj dediĉiĝas al la revivigo de antikvaj lingvoj antaŭe subpremitaj kaj al la potenciigo de ĉiuj aferoj de la koncerna nacio, kiel la kazo, konata de mi, de iu esperantistino plendediĉita al la ellaborado de enciklopedio pri la homoj kaj la aferoj de ŝia etna regiono. Male, estas aliaj esperantistoj kiuj tre konsciaj pri la universalisma karaktero de Esperanto sintenas malamike kontraŭ ĉiujn esprimo de etna naciismo. Tiel okazas

kun alia esperantisto, konata de mi, kiu kverelas kontraŭ la aktivuloj de lia loĝregiono kiuj penlaboradas por la rehavo de la antikva, tradicia lingvo de tiu regiono.

Estus bone demandi al ni: inter ambaŭ menciitaj kontraŭaj kondutoj, kiu estis, reale, la opinio de nia Majstro L.L.Zamenhof. Ĉar okazas ke pri tiu ĉi afero li multe povas instrui tial ke li, kiel pola judo, apartenis al popolo ĉiam tre subpremata kaj ne nur en la lingva kaj kultura tereno. Tiurilate ni vidu kion li diras pri tiu afero en iu el siaj skribaĵoj:

Se mi ne estus hebreo, tiam mi povus min fordoni al mia revo tute kaj absolute; sed ĉar mi apartenas al popolo, kiu tiom multe suferadis kaj plej parte ankoraŭ nun terure suferas (precipe en Rusujo, kie la konstantaj ĝemoj de mia malfeliĉa terure premegeta kaj kalumniata popolo venenas al mi la vivon), tial tre ofte turmentadis min la penso, ke mi ne havas la moralan rajton, laboradi por idelaoj neŭtrale homaj, kiam mia popolo tiom multe suferas kaj havas por si tiom malmulte da batalantoj. Krom tio, mi ofte ripetadis al mi: «Kiam hebreo laboras por la unuigado de la homaro, oni nur mokados kaj atakados lin, oni diros, ke li faras tion nur el egoismo, por depreni de la pli feliĉaj nacioj tiujn privilegiojn, kiujn ili havas en komparo kun la malfeliĉa kaj ĉie persekutata hebrearo. Fortigu la situacion de via propra popolo, donu al via popolo landon, lingvon kaj gloron, kaj nur tiam, vi havos la rajton paroli pri unuigado de la popoloj, tiel same kiel pri socialaj reformoj povas sukcese paroli nur riĉulo, kiu ofertas, sed ne malriĉulo, kiu postulas». Ĉiufoje, kiam tiuj pensoj min atakadis, en

mi vekigadis ambicio pri mia ĉiam persekutata kaj en ĉiuj rilatoj malfeliĉa popolo kaj mi (pro amo al mia ĉefa idealo mem) fariĝadis patrioto de mia popolo. Longan tempon en mia juneco mi estis varmega "sionisto" (tiam la sionismo ne estis ankoraŭ en modo, mi estis unu el la unuaj pioniroj de tiu ĉi ideo kaj tiam miaj sampopolanoj forte mokadis min, kiam mi kun flameco kaj profunda kredo paroladis al ili pri la rekonstruo de la Palestina hebrea regno). Mi laboris energie por tiu ideo, mi fondis sukcese la unuajn grupojn sionistajn. (Post 3-4 jaroj de energia laborado por la sionismo mi venis al la konvinko, ke tiu ĉi ideo kondukos al neniam celo kaj tial mi forĵetis tiun ĉi ideon, kvankam en la koro ĝi restis por mi ĉiam kara, kiel agrabla sed neplenumebla revo; kiam en 1897 naskiĝis la granda sionista movado aranĝita de Herzl, mi jam ne povis aliĝi al ĝi). Sed tiam, kiam mi estis flama sionisto, mi neniam ĉesis revadi kaj laboradi por la ĉefa mia ideo (unuigo de la homaro). Mi esperis, ke, kiam mia popolo akiros iam sian antikvan hejmon kaj feliĉecon, ĝi plenumos kun sukceso tiun sian historian mision, pri kiu revis Mozeo kaj Kristo, kaj vole-ne-vole ĝi devos fondi popolon kaj landon idean, neŭtrale homan kun neŭtrala sengenta lingvo kaj neŭtrale-homa filozofie-pura religio, kaj plenumiĝos la vortoj de la Biblio, ke ĉiuj popoloj venados Jeruzalemon por adoradi la unu kaj solan «Dion» kaj Jeruzalemo fariĝos centro, kiu frate unuigos la tutan homaron...

Nu, ni vidas kiel li konfesas ke iutempe li estis «patrioto de lia popolo» laŭ lia propra esprimo, kaj varmege aktivadis favore al la sionismo eĉ antaŭ la jaro 1897 kiam Teodoro Herzl fondis la sionistan movadon; ankaŭ en tiu ĉi afero li marŝis antaŭen ol liaj samtempoj. Li trafe klarigas la kialojn de sia juna flameco kaj energia laborado favore al la naciismo de sia popolo. La radikoj kaj

fonto de tiu sento estis la amo al sia popolo ĉiam kaj ĉie persekutata.

Pli-malpli, tia estas la kazo de ĉiuj naciistoj de ĉiuj ajn popoloj. Ilia strebado meritas la respekton ŝuldata al ĉiu homo kiu batalas defendante siajn rajtojn. Ĉi-rilate ne estas trafa la sinteno de tiu esperantisto, kiun mi menciis, kiu atakas la entuziasmajn aktivulojn de etna regiona lingvo. Oni ne devas vidi danĝeron por Esperanto en la renaskiĝo kaj plifortiĝo de tiuj etnaj lingvoj. La domaĝo por Esperanto venas de lingvo, etna aŭ nacia, kiam oni pretendas modskale trudi ĉi tiun kiel internacia lingvo, kiel okazas nuntempe kun la angla lingvo. Kontraŭ tiu internacieco de nacia lingvo devas batali la geesperantistoj, ne kontraŭ la plifirmiĝo de la Bable en sia asturia prasidejo.

Jes, sed krome nia Majstro Zamenhof pretersuperis sian naciisman senton. Li neniam kondukis malamike kontraŭ la homoj kiuj pasie bataladis por la aferoj de siaj respektivaj nacioj, sed tamen li sciis transcendi aŭ pretersuperi tiun senton kiel io apartenanta al homa stadio kiu devas esti trapasita. La naciismaj aferoj estas respektendaj samkiel estas respektendaj la aferoj de homa junaĝa stadio: la ploroj kaj la ludoj de la geinfanoj, la petolado de la gejunuloj... Sed la plenaĝa homo superinte tiujn fruajn etapojn de sia evoluo serioze dediĉiĝas poste al pli altaj celoj. Tiurilate estas grandioza leciono por la naciistaj geesperantistoj la forlason de la sionismo fare de Zamenhof por dediĉiĝi al altaj kaj sublimaj celoj kiu koncernas al la tuta homaro kiel granda familio, la «reunuigo de la homaro» laŭ lia esprimo, en granda rondo familia, sen malamo nek militoj, kaj kun religia unueco en la kredo al unusola Dio, sen la dogmoj kiuj dum jarcentoj dividis la homaron.

La distanco kiu ankoraŭ malproksigas nin de tiu alta celo tiom grandas kiom la distanco inter la moralaj kaj intelektaj kvalitoj de Zamenhof kaj ties de plejparto el nia ankoraŭ infanaĝa homaro.

SON DE LA LOMA

Miguel Matamoros
Esperantigis : Maritza Gutiérrez
Ĝenerala Sekretario de K E A

Panjo scivolemas mi
devenon de la kantantoj
ilin trovas mi galantaj
kaj renkont' estas sopir'
kun kanzonoj
ilin volas lerni mi.



Kio pri la deven'
aj Panjo
eble el Havano
eble el Santiago
suverena flago

Ili ja montanas
Kaj ĉe ebena kantas
Scios vi? Kial ne?
Panjo ili ja montanas
Panjo kaj ĉe ebena kantas.

LA UNUA KANGURUO



Aborigena mito rakontas kiel, dum uragano, la unuaj kanguruoj estis emblovitaj en Aŭstralio. La kompatindaj kreitaĵoj tute ellaciĝis dum la freneza kvazaŭ-flugo. Ne eblis surteriĝi kvankam, pro la daŭraj klopodoj por gajni piedtenon, iliaj postkruroj estis jam forte plilongiĝintaj.

Aro da aborigenaj ĉasistoj, troviĝante tie kaj spertante kiel la terura ventego elradikigis arbojn kaj arbustojn kaj forrazis eĉ la herbon el la grundo, estis devigata serĉi la ŝirmon de rokaj kavoj. De tie, tra la kirliganta rubaĵo en la alto, ili vidis, pro miro gapante, la preterŝvebantajn kanguruojn.

Ho, neniam antaŭe ili vidis tiajn strangajn bestojn. Etkapaj ili estis kun nur mallongaj brakoj, sed grandajn korpojn ili havis kun longaj fortikaj vosto kaj kruroj, per kiuj ili daŭre provis tuŝi la teron, nur por esti forbalaitaj de la ventego.

Tamen, dum blovpaŭzo, ili vidis kiel kanguruo, kiu enplektiĝis en arbobranĉoj, falis teren sed tuj hopsaltegadis for el ilia vido.

Ekestis en ilia menso la ideo, ke tiuj grandaj bestoj provizus manĝaĵon por multaj el ili. Do, la tuta tribo poste transmigris al la loko de la malkovro de la kanguruoj. Cetere la nova grundo ankaŭ montriĝis tre fekunda, akvoriĉa kaj fruktodona.

Tamen estas menciinde, ke longa tempo pasis ĝis la ĉasistoj eltrovis rimedojn por kapti la kanguruojn, la plej grandajn kaj rapide kurantajn el ĉiuj aŭstraliaj bestoj.

Tradukita de Karl Gunster, Bribano

Kunlaborantino: Jennifer R. Bishop. (Aŭstralio)

DANKON, LA VIVO

Iam oni prikantis la rozkoloran vivon.
Per versoj mi tuj diros la tre dankindan vivon.

Versoj similaj al la prozo
ĉar liberaj kiel aero.


La vivo !

Jen tie tre mallonga vorto.
Tamen ĉirkaŭ ĝi kiom da motoj !
Belega vivo aŭ stranga vivo,
viv' el laboro, viv' el plezuro
vivo revema, vivo senzorga,
ĉiuj povus pleniĝi nur unu solan vivon.

Ciferoj komencas la vivon,
tio estas la jaro, la monato kaj tago
en kiuj ni ĉiuj naskiĝis.
Fino de l' vivo ? Ni silentu. Neniu konas
tagon kaj horon kiam rompiĝos la fadeno.

Feliĉe !

Malantaŭ ni : la estinteco,
kaj antaŭ ni : la estonteco.
Inter la du, vivo nin puŝas
Tiam al ŝi ni diru : "Haltu !"
kaj rigardadu ĉirkaŭ ni
printempe la silkajn burĝonojn,
aŭtune la belegan ĉielon,
arĝentan maron somervesper'
kaj vintre la dancajn neĝerojn...
Se la sezona sablhorloĝo
daŭre kaj senkompate fluas
ni tamen ridetu kaj diru
"Dankon, mil dankojn ho vivo !



F. Terral

(FRANCIO)



Amuzajoj

CISIMO



Baldaŭ edziniĝinta filino (poste la edziniĝ-nokto) telefonas al sia patrino

- Panjeto mia, panjo, mia edzo petis min boligi la teon, sed en kulinara libro pri tio ne estas ĉe unu vorto

Ivan Varjuhin - Rusio

Dieto por maldikiĝo

- Kio okazis kun via dieto por maldikiĝo? Ĉu vi ankoraŭ fastas du tagoj semajne?

- Ah! Vidu, mi prokrastis ĝin pri la vintro, tiam la tagoj estas pli mallongaj.

Lilija Koleva - Bulgario

Enamigulo promenas kun sia fiancino sub luma luno kaj li diras al ŝi.

- Karulina: ĉu vi akceptus esti la patrino de miaj gefiloj?

- Jes, se vi akceptus esti la patro de miaj gefiloj; mi havas du kaj atendas alian.

Amiko diras alian:

- Antaŭ mallonga tempo mi aĉetis pentraĵon, kaj nun iu diras min ke ĝi estas de Goya.

- Ii ne pravas, se vi aĉetis la pentraĵon, ĝi estas via.

Estas tri periodoj en la vivo, kiam viro ne komprenas virinon:

**Konante ŝin,
konante ŝin,
kaj konante ŝin.**

Patricia Harkin - Australio

PETAĴO

Mi petas humorajojn el diversaj landoj por publikigi en ĉi tiu revueto. (mi antaŭdankas)
Sendu al:

CISIMO R. SIMON
c/ La magdalena n° 26 - 1° D
C.P.33400 - AVILES
ASTURIAS - ESPAÑA

Ora juneco

1 Sen-tis nur ĝojon mi en in-fan-aĝ', tra-fis nek ĝen'
7 nek la ĉag-ren'. Tempon ti-a-man dum vi-vo-vo-jaĝ'
13 gar-das me-mo-ro sen pen'. La o - ra ju -
19 ne - co ne fa - las for, e -
25 ter - ne ĝi res - tas en mi - a kor'.

2.

En la juneco min kaptis la am',
dolĉa memor' estas la hor',
Neforgesebla momento, la flam'
ardas ĉiame en kor'.

La ora juneco ne falas for,
eterne ĝi restas en mia kor'.

Laŭ la kolekto, kiu Laura Liukkonen kun aliaj membroj
de Tamperea E-klubo, surpaperigis dum la 80^a UK